Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

31-a Jarkolekto * Marto 2017 * N-ro 104

ISSN 1576-0618



Quesada: naturo, koloroj kaj poezio.

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruiz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
(esperanto14@ono.com)

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio 3
Seminario "Esperanto kaj Sociaj Sciencoj en la Universitato de Sevilo 8
La Brunuloj de *Gibraleón* 14
Lingva Angulo 18
Poezia Angulo 21
Turismi en *Quesada* 23
Paĝoj pri nia Historio 27
Flamenko 34
Andaluzia Kuirarto 35
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio 37
Krucvortenigmo 40
Humuro 42

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO

SEVILO

★ De tempo al tempo Sevila Esperanto-Asocio organizas kulturajn vizitojn al monumentoj kaj historiaj lokoj de la urbo. Dum la vizito oni havigas al la ĉeestantoj malgrandan vortaron kun vortoj rilataj al la vizitata loko. Nia samideanino Lola Perea estas la ĉefa organizanto kaj prizorganto de ĉi tiuj vizitoj. Lasta-tempe la membroj de la asocio kaj simpatiantoj havis la ŝancon vidi jenajn lokojn:

- Belarta Muzeo, kie José María Spinola, elstara pentristo kaj membro de la asocio, agadis kiel ĉiĉerono.
- Paviljono de la Respubliko Ĉilio de la Iberoamerika Ekspozicio.
- Parlamento de Andaluzio.
- Kultura ekspozicio en la Turo Pelli.
- Preĝejo "San Luis de los Franceses", unu el la plej gravaj juveloj de la barokaj konstruaĵoj en Sevilo.



Membroj de Sevila Esperanto-Asocio kaj simpatiantoj okaze de vizito al la Parlamento de Andaluzio.

★ Paralele al aliaj agadoj pri la internacia lingvo organizataj en la Fakultato pri Psikologio de la Universitato de Sevilo, de la 3-a ĝis la 7-a de aprilo oni montris en tiu universitata centro ekspozicion pri Esperanto, organizata de Sevila Esperanto-Asocio kaj Hispana Esperanto-Federacio. Temis pri dekkvino da montr-paneloj kie oni klarigis kio estas Esperanto kaj oni informas pri Esperanto-movado.



MALAGO

★ Fine de la pasinta monato marto, la radio-stacio Radio Onda Color de Malago intervjuis al nia samideano Juan García del Río.

Demandoj kaj respondoj montris favoran kaj pozitivan etoson rilate la internacian lingvon. Laŭ sciigo de Juan García, li ne disponis pri multe da tempo por prepari respondojn, tamen, kiel dirite, estis tre pozitiva la intervjuo, tiel nia samideano eĉ havis la eblecon aserti, ke *"la uzado de neŭtrala lingvo estas justa solvo por la monda interkomunikado."* Gratulon Juan !




VIZITOJ DE ESPERANTISTOJ EN ANDALUZION




Brazila samideano, S-ro Marcio Alexandre, trapasis Andaluzion okaze de sia projektata vojaĝo tra la mondo per biciklo. Lia unua etapo estis Lisbono – Maroko.

Li restis dum kelkaj tagoj en Kordovo kaj Sevilo, kie li ricevis la helpon kaj ĉiĉeronadon de esperantistoj. Marcio Alexandre estas profesoro pri angla lingvo kaj kuntrejnisto por atingi specifajn personajn aŭ profesiajn celojn.







La pasintan 26an de aprilo Manolo Parra, Prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo vizitis Malagon, okaze de labor-vojaĝo. Li renkontiĝis kun kelkaj geesperantistoj de la urbo por tagmanĝi, kafumi kaj konversacii.

ALHECIRO


★ Sciate, ke dum la pasinta Andaluzia Kongreso de Esperanto oni omaĝis al antekera esperantisto S-ro Higinio García Gómez-Quintero. Siafoje, Alberto Pérez de Vargas, unu el la plej bonaj amikoj de Higinio García en Hispanio, sciigis pri ĉi tiu omaĝo en la alhecira ĵurnalo *"Europa Sur"*. La titolo de la artikolo estis "Higeno", komence de ĝi la aŭtoro klarigas, ke tiu estus la nomo de Higinio García en la lingvo esperanto.

Alberto Pérez de Vargas kontribuis al la organizado de la omaĝo dum la Kongreso, sciigante pri kelkaj aferoj en la vivo de Higinio García kaj eĉ ebligante la kontakton de la organizantoj kun la vivdino de la antekera esperantisto.

KORDOVO

★ La kordova interreta ĵurnalo *"La Voz de Córdoba"* aperigis artikolon pri S-ro Luciano Gisbert y Höel, franc-devena kordovano, li naskiĝis en Parizo meze de la 19-a jarcento kaj komence de la 20-a li alvenis en Kordovon por instrui la francan lingvon en la provinca gimnazio. La artikolo ankaŭ mencias la fakton, ke li estis la unua prezidanto de la Esperantista Grupo, kreita en Kordovo en la jaro 1909.

La aŭtoro de la artikolo estas la prapranepo de tiu elstara kordova esperantisto.



Ĉu Vi ankoraŭ ne fariĝis membro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo ?

Se Vi deziras:

★ kunlabori en la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio kaj

★ helpi la diskonigon de la andaluzia kulturo en la esperantista mondo.

Jen Via Asocio


Koston de la kotizo kaj adreson de nia asocio Vi trovos sur la paĝo 20-a. Nun ni informas, ke ĉi-jare ĉiuj membroj de nia asocio ricevos senpage jenan donaceton:

- 8 Gb memor-bastonon, tute senapaga por niaj membroj.

Do, ne hezitu aliĝi al Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. Esperanto estas bona ideo kaj alloga projekto, kunlaboru en ties disvastigado.



SEMINARIO "ESPERANTO KAJ SOCIAJ SCIENCOJ" EN LA UNIVERSITATO DE SEVILO




La pasintan 21-an de aprilo en la Fakultato pri Edukado de la Sevila Universitato, okazis seminario pri "Esperanto kaj Sociaj Sciencoj". La celo de ĉi tiu labor-tago estis pritrakti la temon "Premadon" kaj pli specife "Lingvistikan Premadon" kaj kian rolon povas ludi esperanto kiel liberigilo kontraŭ tiu premado.

La organizanto de la seminario estis nia samideano Vicente Manzano, profesoro en la Fakultato pri Psikologio de la Universitato de Sevilo kaj li ricevis la kunlaboron de la Sevila Esperanto-Asocio.

Matene okazis la unua prelego sub la temo *"Esperanto: contenido, historia e instituciones internacionales"* (Esperanto: kio estas, historio kaj internaciaj asocioj). La preleganto estis la sevila esperantisto Antonio Rodríguez Gasch. Li asertis ke la malkono rilate esperanton kaj la artefarita naskiĝo de la lingvo faciligas la aperon de ne-objektivaj antaŭ-juĝoj kontraŭ ĉi tiu lingvo kaj pro tio povas aperi eraroj kiam temas pri valorigi ĝin. Tiel, ĉiuj internaciaj lingvo-projektoj sekvas unu el jenaj modeloj: *aprioraj* kaj *aposterioraj.* Se temas pri *aprioraj* projektoj, ili estas tute utopiaj, ĉar ili baziĝas sur parkera lernado de vortoj kaj gramatiko. Tamen, tiuj *aposterioraj,* kiel

esperanto, faciligas la lernadon, ĉar ĝi baziĝas sur aliaj ekzistantaj lingvoj, kaj ne sur tute nova vortaro aŭ gramatika konstruo.



Antonio Rodríguez Gasch, dum la prelego

La sekvanta preleganto estis Juan de Dios Díaz Bautista, arunda esperantisto kiu prelegis pri la temo "*Esperanto y Academia: iniciativas internacionales en ciencias y universidad*" (Esperanto kaj Akademio: internaciaj iniciativoj en la scienco kaj en la universitatoj). Li parolis pri la lingvo kaj ĝia komunumo kaj iliajn rilatojn kun la scienca, arta kaj literatura socio. Li elstaris nuntempajn eblecojn kunligi la tutan mondon pere de la interreta socio kaj pri la bezono adopti justan kaj demokratian lingvan politikon kaj tiel eviti tutcertajn ekonomiajn kaj soci-kulturajn diskriminaciojn.

Laŭ Azbau, la angla lingvo regas dank'al la nuntempa ekonomia kaj industria sistemo; male, la ĉefa etoso de esperanto ne estas tiu kapitalisma sistemo, sed la nuntempaj internaciaj komunikiloj, kie homoj povas renkontiĝi kaj interkompreniĝi pere de esperanto. Li sciigis la datumon, ke post 14 jaroj, 235.000 homoj aliĝis al *Lernu*, la plej nombra interreta loko por la disvastigo de esperanto.



Juan de Dios Díaz Bautista, okaze de la prelego

Kiel daŭrigo de la seminario Guillermo Molleda Jimena, kordova esperantisto kaj profesoro en la Universitato de Sevilo, parolis pri la projekto ekigita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo, cele la atingon de oficiala agnosko de la diplomoj pri kono de esperanto fare de la andaluziaj universitatoj. La projekto komenciĝis antaŭ kelkaj jaroj kaj ĝi konkretiĝis dum la andaluzia kongreso de esperanto en Jerezo en la jaro 2016. La celo estas meti je la sama nivelo la diplomon pri kono de esperanto de la Universitato de Budapeŝto, ĝis nun la sola oficiala instanco disdoni ĉi tiujn atestilojn, kaj la diplomoj de aliaj lingvoj kaj aliaj universitatoj jam agnoskitaj en Andaluzio, kiel la angla, franca, germana … kaj tiel ĝis proksimume dudek lingvoj.

Sendube, ĉi tiu agnosko pliallogigos la lernadon de la internacia lingvo al la andaluziaj universitatanoj, ĉar tutcerte esperanto estas estas pli facile lernebla kaj pli malmultekosta rilate aliajn lingvojn.

Poste estis la momento de la studentoj de la Fakultato pri Psikologio, kiuj prezentis la rezultojn de siaj propraj esploroj.

María Peguero kaj Almudena Rodríguez diskonigis resumon de angla-lingvaj eseoj pri esperanto. Ili same prezentis utilajn datumojn rilate la lernadon de la angla lingvo fare de hispanoj, tiel:


54% el la hispanoj eklernis la anglan lingvon.
17% el ili, elspezis pli ol 1.000 eŭroj okaze de tiu lernado.
9% eĉ pli ol 5.000 eŭroj.

La averaĝa mon-kvanto en la lernado de la angla lingvo estas 1.330 eŭroj, preskaŭ duoble ol la kvanto mond-skale, kiu estas 740 eŭroj. La plejmulto el ĉi tiu mon-kvanto devenas el la familiaj enspezoj, do ĝi ne estas rekte alportita de la lernanto. Kaj fine, preskaŭ ĉiuj studentoj opinias, ke la plej efika maniero lerni la anglan lingvon estas sekvi kurson eksterlande.


Krom la monaj elspezoj, ankaŭ estas necese paroli, laŭ María Pequero kaj Almudena Rodríguez, pri "psikologiaj aŭ emociaj elspezoj". Tiel, multaj intervjuatoj asertis, ke tiom da lerno-jaroj de la angla lingvo *"utilis por nenio"*, kaj multaj homoj eĉ sentis sin mem kiel idiotoj ĉar ili atingis eĉ ne la B1-diplomon.

Rilate la opinion de la intervjuatoj en la Universitato de Sevilo pri esperanto, la plejmulto sciigis sian favoran opinion. La rezultoj de ĉi tiu konkreta esploro utilos por dosiero prezentota antaŭ la Universitato cele la oficialan agnoskon de la diplomo pri kono de esperanto.

Fine, Pilar Guerrero kaj Javier Márquez ebligis video-konferencon kun la Profesorino Roxana Alessa Schwikert, germana esploristo kiu ankaŭ deziris ĉeesti iamaniere la seminarion. Ŝi nuntempe preparas labor-studon sub la temo "Esperanto kiel mito".



Guillermo Molleda Jimena, prelegas dum la seminario






Studentoj partoprenantaj en la Seminario en la Universitato de Sevilo

La Seminario finiĝis vespere, tiam la profesoro Vicente Manzano, ĉefa organizanto, prezentis resumon. Laŭ li, estas necese liberigi la akademian mondon de la lingvaj subpremigiloj, tiel estas necese:

1) Antaŭenirigi esperanton ekster la akademio.
2) Labori en la universitato cele la atingon de pli libera kaj racia mondo, kaj tiel atingi pli bonan mondon. Kaj en ĉi tiu celo esperanto povas ludi tre aktivan kaj signifo-plenan rolon.

Gratulon al la organizantoj de la Seminario, ĉefe al Profesoroj Vicente Manzano kaj Guillermo Molleda kaj al ĉiuj studentoj kiuj dum multaj liberaj horoj okupis sin en la preparado de raportoj, statistikoj kaj intervjuoj por prepari siajn prezentojn.



Profesoro Vicente Manzano, ĉefa organizanto de la Seminario.

La *brunuloj* de Gibraleón

La popolaj rakontoj nomis ilin *"tiuj de la ŝipo"*, aliaj *"la nigruloj de Kolombo"*, tamen ĝis nun, nenia serioza esploro klarigis kial en Onubo, kaj ĉefe en la vilaĝo Gibraleón, ekzistis granda grupo de homoj kun afrikaj rasaj karakteroj.

En la jaro 1952 esploristo kalkulis, ke 500 homoj loĝis ĉe kvin onubaj vilaĝoj: Onubo, Niebla, Moguer, Palos de la Frontera kaj Gibraleón, kun tiuj karakteroj, tamen en ĉi lasta vilaĝo, Gibraleón, loĝis pli ol 200. Nuntempe kaj ĉefe post la 80-a jardeko, la ras-miksado estas kompleta kaj hodiaŭ estas tute ne-eble trovi komplete tiujn afrikajn rasajn karakterojn.



Kvartalo kaj domoj kie loĝis la *nigruloj* de Gibraleón en la 50-a jardeko.

Kiu estas la origino de ĉi tiuj homoj? Unue, estas necese diri, ke nenia scienca aŭ historia bazo pravigas la popolan eldiraĵon laŭ kiu, ili venis el Afriko per ŝipo kiu ne sukcesis trovi la vojon en Amerikon, tiu estus la kialo de la nomo *"tiuj de la ŝipo"*. Ankaŭ ili ne venis el

Ameriko okaze de la unuaj vojaĝoj de Kristoforo Kolombo, jen la alia popola nomo de ĉi tiuj onubanoj: *"la nigruloj de Kolombo"*. Do, kiam kaj kiamaniere ili venis en Andaluzion?





Virino en Gibraleón. Jaro 1952

Kiam ni pripensas la nigrajn sklavojn, ni tuj memoras tiujn filmojn kie aperas sklavoj en la koton-plantejoj apud la rivero Misisipo en Usono. Tie ne mankis ĉenoj kaj vipo-batoj. Ni ankaŭ scias pri tiuj britaj aŭ nederlandaj ŝipoj kiuj vojaĝis el Afriko en Nordamerikon por transporti tiujn sklavojn. Jes, tio okazis tiel ekde la 18-a jarcento, tamen la sklaveco ne komenciĝis tiutempe.

Ĉi tiuj teruraj okazintaĵoj ne komenciĝis post la eltrovo kaj konkero de la novaj amerikaj teritorioj. Kontraŭe, unu jarcento antaŭen en Eŭropo, portugalaj maristoj esploris la afrikajn marbordojn kaj komence de la 15-a jarcento ili alvenigis la unuajn afrikajn sklavojn en Eŭropon tra portugalaj havenoj, kiel tiu de Lisbono aŭ en la suda Algarvo kaj ankaŭ tra Andaluzio, per la havenoj de Kadizo kaj Almonto en la onuba provinco. Ankaŭ ekzistis alia sklavo-vojo el Nordafriko ĝis eŭropaj havenoj en Valencio, Majorko, Sicilio, Napolo kaj Venecio, tamen ĉi-kaze temis pri islamaj nordafrikaj sklavoj. Male, ankaŭ troviĝis kristanaj sklavoj en la nordo de Afriko, ĉefe hispanoj kaj italoj.

La ĉefa sklavo-merkatejoj troviĝis en Sevilo kaj Lisbono. En Andaluzio ili troviĝis ĉefe en Onubo, Sevilo kaj Kadizo. Laŭ kalkuloj, inter 15% kaj 20% el la tiutempa enloĝantaro estis nigraj sklavoj. Kaj kvankam al ili mankis io tiel esence homa kiel la libereco, verdire ili ne suferis malbonajn traktojn, eĉ ekzistis leĝoj punigantaj la malbonan

traktadon kontraŭ la sklavoj. Ili ofte laboris ĉe la domo de la mastro kiel servistoj kaj kvankam estis eble heredi la sklavojn post la morto de la mastro, verdire ĉiuj sklavo-posedantoj liberigis ilin per testamenta decido.

Kiel kuriozaĵo ni diru, ke en Sevilo eĉ oni organizis religian kunfratiĝon de nigraj sklavoj por marŝadi dum Pasko. Temas pri la ankoraŭ konata kiel *"Cofradía de los Negritos"* (Kunfrataro de la Nigruletoj).

VENTA DE ESCLAVOS.

UNA NEGRA se vende, recien parida, con abundante leche, escelente lavandera y planchadora, con principios de cocina, jóven, sana y sin tachas, y muy humilde: darán razon en la calle de O. Reilly nº 16, el portero. 6 30


UNA NEGRA se vende por no necesitarla su dueño, de nacion conga, como de 20 años, con su cria de 11 meses, sana y sin tachas, muy fiel y humilde, no ha conocido mas amo que el actual, es regular lavandera, planchadora y cocinera: en la calle del Baratillo casa nº 4 informarán. 31

Reklamoj aperantaj sur sevilaj ĵurnaloj dum la 19-a jarcento. Ilia celo estis la vendado de sklavinoj. Sur ili oni elstaras la kvalitojn kiel servistinojn de ambaŭ virinoj.

Tamen post la 18-a jarcento la afero pri la sklaveco ŝanĝiĝis. Oni ne transportis jam pliajn sklavojn en Eŭropon, sed rekte en Amerikon pere de britaj, francaj kaj nederlandaj ŝipoj. La celo estis laborigi ilin en la agrikulturaj plantejoj en Nordameriko kaj Brazilo. Tiuj kiuj ankoraŭ venis en Andaluzio akompanis siajn mastrojn, kiam ili revenis el Ameriko, ĉefe el la insulo Kubo. La sklavecon en Hispanio oni malpermesis definitive en la jaro 1837, tamen ĝi daŭriĝis en la insulo Portoriko ĝis 1873 kaj en Kubo ĝis 1880.


Kial, do, la idaro de tiuj eksaj sklavoj koncentriĝis en Onubo kaj pli konkrete en la vilaĝo Gibraleón? Nu, du teorioj ekzistas por respondi tiun demandon kaj eble ambaŭ estas pravaj. Oni diras, ke preskaŭ ĉiuj afrika sklavoj eniris en Hispanion tra la onuba provinco,

do, sendube ĉi tiu andaluzia zono posedis la plej grandan nombron da sklavoj. Ankaŭ oni diras, ke post la liberiĝo multaj el ili decidis reiri en lokon kie loĝis aliaj sam-rasaj homoj, do en Onubo kaj pli konkrete en Gibraleón.



"Tri infanoj", pentraĵo de la sevila pentristo Bartolomé Esteban Murillo (1617-1682). Laŭdire, por pentri la nigran infanon aperanta sur la bildo, Murillo uzis kiel modelon sian junan sklavon Juan.

Post la intercivitana milito okazis ras-miksado en Gibraleón kaj tiel, jam en la jaro 1980 estis tute ne-eble renkonti homon en tiu vilaĝo kun tute klaraj afrika ras-karakteroj.



Amu vian landon: konu ĝian historion !

Lingva Angulo

Verbigo de adjektivoj kaj adverboj



clipartof.com/1233388

Unu el la plej gravaj allogaĵoj de la lingvo esperanto estas la libereco de la parolanto rilate la kreadon de novaj vortoj kaj gramatikaĵoj, kiuj povas esti perfekte komprenataj de la aŭskultanto. Ne temas pri vort-ludoj aŭ vort-kapricoj de tiu kiu parolas aŭ skribas, sed pri la ebleco oferita al tiu kiu uzas nian lingvon komprenigi sin per persona parol- maniero. Unu el tiuj esprim-liberecoj baziĝas sur la uzo, aŭ ne uzo, de la verbo esti.

La verbo ESTI (*ser, estar, haber* en la hispana lingvo) havas plurajn signifiojn kaj uzojn. Ĝi estas ankaŭ uzata kiel helpverbo, ĉar ĝi ofte ne havas multe da signifoj per si mem, ĝi simple helpas kiam ni konstruas frazon. La verbo *esti* utilas por ligi la subjekton kun io kion oni diras pli, ekzemple:

- Petro estas alta *(Pedro es alto).*
- Via patrino estis bela (*Tu madre era bella).*
- Morgaŭ estos lundo *(Mañana será lunes).*

Do, se la verbo ESTI ne estas tre grava en la frazo, ĉu estus eble forlasi ĝin? Jes, temas pri tio kio Bertilo Wennergren, en la libro *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko,* nomigas ”verbigon de perverba priskribo”. Tio estas, ni forlasas la verbon ”esti” en frazo, tamen ni verbigas la priskribon de tiu forlasita verbo.

Por klarigi la aferon ni vidu kelkajn ekzemplojn:

Normala uzo de ESTI	Verbigo de perverba priskribo
Petro estas alta.	Petro altas.
Via patrino estis bela.	Via patrino belis.
Morgaŭ estos lundo.	Morgaŭ lundos.

Tiamaniere, ni kreas verbon, ofte eĉ verbo antaŭe ne-ekzistanta, kiam ni forigas la verbon ESTI en la frazo. Tiel, ĉu ekzistas la verbo "lundi"? Tamen, ekzistanta aŭ ne-ekzistanta, se oni diras "Morgaŭ lundos", ĉiuj komprenas, ke morgaŭ, laŭ la kalendaro, estos lundo.

Kelkaj uzoj de tiu verbigo de perverba priskribo jam estas tute akceptitaj, ni vidu kelkajn:

- Estas necese paroli laŭte ĉe viaj gepatroj, ĉar ili estas preskaŭ surdaj.

  Necesas paroli laŭte ĉe viaj gepatroj, ĉar ili preskaŭ surdas.

  (Es necesario hablar en voz alta en casa de tus padres, porque ellos están casi sordos).

Ambaŭ frazoj signifas same, tamen la vortoj *"estas necese"* sur la unua frazo, fariĝis *"necesas"* sur la dua. Ankaŭ tiu *"esti surdaj"* fariĝis *"surdas"*. Ĉu ekzistis ia miskompreno se ni komparas ambaŭ frazojn? Neniu !

Jen pliaj ekzemploj:

- Estas dece oferi la sid-lokon al maljunulo.
  Decas oferi la sid-lokon al maljunulo.

- La luno ne estas videbla dum la tagmezo.
  La luno ne videblas dum la tagmezo.

Iuj opinias, ke estas eraro verbigi tiujn vortojn, tamen multaj el ili jam aperis sur la *Fundamento* de la D-ro Zamenhof kaj krome ili estas vaste uzataj.

Kompreneble la uzo de la verbo *esti plus adjektivo aŭ adverbo* ĉiam estas korekta, tamen ni povas ofte anstataŭigi ĝin per la verbigo de tiu adjektivo aŭ adverbo. Esperanto estas lingvo ebliganta tiun liberecon al uzanto.



ALIĜU AL
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.

Por aliĝi al AEU kontaktu kun: esperanto14@ono.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- Banco BMN (eksa Caja General de Ahorros de Granada)
  ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2017

aeu
Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

75-a datreveno de la morto de la poeto
MIGUEL HERNÁNDEZ
1910 ~ 1942

En Orihuela, lia kaj mia naskoloko, kvazaŭ pro fulmo mortis Ramón Sijé, kun kiu mi amis tiom da aferoj

ELEGIO

Plorante, zorgi volas mi pri l'horto,
en kies tero vi, kompano kara,
kaŝadas sterke ekde l'frua morto.

Nutradu ĉi dolor' sen plor', amara,
bukcenan, pluvan kaj orgenan ĥoron,
ke mi al papavaro velko-stara

kiel nutraĵon donu vian koron.
Ĉe mi doloroj svarmas nun sen sato:
eĉ en la spiro havas mi doloron.

Manfrapo ege dura, frosta bato,
la nevidebla hak' definitiva,
ekpuŝo kruda vin faligis, frato.

Amplekse plejas mia vund' aktiva,
mi veas en mizer' super mizeroj
kaj sentas pli vin morta, ol min viva.

Mi, sur kadavro-stoploj, sen esperoj,
sen homa varmo, paŝas senkonsola
de mia kor' al miaj viv-aferoj.

Ekflugis frue via morto bola,
l'aŭroron frue vekis lumostrio,
surtere frue vi ruliĝas sola.

Malbenon al la mort' en ampasio !
Malbenon al la vivo senatenta !
Malbenon al la ter' kaj la nenio !



Eksplodas mia-mane ŝtorm' aŭtenta
el ŝtonoj, fulmoj kaj ĉirpegaj hakoj,
je katastrof' soifa, malsat-senta.

Mi fosos en la ter' per dent-atakoj,
ĝin trae mi disigos, flanken ŝovos,
aŭdiĝos sekaj, ardaj, dentoklakoj.

La teron minos mi, ĝis vin mi trovos.
Vian kranion kisi, jen la celo.
Malligi, revenigi vin mi provos

al miaj horto kaj fig-arb´ en helo
sur la skafaldoj altaj de la floroj.
Via animo birdos, abelĉelo

el plej anĝelaj vaksoj kaj laboroj;
revenos vi al dolĉa kvero-maro
el sokoj de l'plugistoj trobadoroj;

gajiĝos mi ĝis l'ombro de l' brov-paro;
de flank' al flank' irigos vian sangon
dispute l'´ fianĉin kaj abelaro.

Avara am' instigas mian langon
vin voki, frat' kun velur-kor' jam ŝima,
de migdalaro ŝaŭma en la blankon.


Jen mi al la rozar' flugil-anima
de l' krema migdaluj' por konversado
postulas vin longdaŭra kaj intima,
kamarado plej kara, kamarado.

Tradukis: Miguel Fernández

Turismi en ... Quesada (Jaeno)

Survoje en la Sieron Kazorlon kaj post trapasi la belajn urbojn Ubedo kaj Baezo, troviĝas vilaĝo ankaŭ tre bela. Tie la artoj, ĉefe la pentrado kaj la poezio, plenigas ĉiujn stratojn kaj la paco kaj kvieteco regas la vilaĝan etoson, temas pri Quesada (prononcu: *Kesáda)*. La unuaj enloĝantoj de la zono jam pentris ene de grotoj, kvankam tiuj surrokaj pentraĵoj ne estas viziteblaj hodiaŭ. Bela tombaro, datumita je la Bronz-epoko, pruvas, ke sur tiu zono jam loĝis homoj antaŭ kvin mil jaroj.

La romianoj ankaŭ estis ĉi tie, ili konstruis belajn kampardomojn, unu el ili, tiu de la apuda vilaĝeto *Bruñel*, posedas belegajn mozaikojn, kiujn nuntempe estas eble vidi ĉe la Provinca Muzeo de Jaeno. El la islama epoko estas videblaj ankaŭ restaĵoj en la kastelo *Majuela* kaj en *Tíscar*. La araboj ne nur starigis kastelojn, ili ankaŭ donis la nomon al ĉi tiu vilaĝo, ĉi tiel laŭ la islamanoj, ĉi tiu loko estis "fruktodona tero" kaj jen la traduko de la nomo de la vilaĝo en la araba lingvo, kompreneble post ŝanĝoj en la origina parol-maniero.



Blazono de Quesada

La kastilia reĝo Ferdinando la 3-a konkeris la urbon en la jaro 1234, sed la granada reĝo Mohamed Min rekonkeris ĝin denove en 1300. La vilaĝo apartenis al la islama granada regno-lando, ĝis kiam definitive la Infanto Don Pedro konkeris ĝin en la jaro 1319. Kelkajn jarojn poste, la kastilia reĝo Alfonso la 11-a donacis Quesada al la plej grava urbo Ubedo.

En la jaro 1776 okazis en Quesada elstarinda afero, bedaŭrinde ne tro diskonigata. Tiel, post la plialtigo de la kosto de la pano la virinoj de la vilaĝo ribelis kontraŭ tiu alta prezo. Temis pri la unua virin-ribelo okazanta en Hispanio, en la tempo koincidis kun la tiel nomata: *motín de Esquilache*, ribelo kontraŭ la ĉefministro de la reĝo Karolo la 3-a, tamen en Quesada la ĉefroluloj de tiu ribelo estis la virinoj.

Nuntempe Quesada estas vilaĝo kies ĉefa ekonomia rimedo estas la terkulturado. Tie oni produktas unu el la plej altkvalitaj oliv-oleoj en la provinco Jaeno. La turismo ankaŭ estas tre grava, pensu, ke la vilaĝo troviĝas tuj apud la Natura Parko Kazorlo, loko nepre vizitenda en la andaluzia geografio.

Monumentoj

- Romia kampar-domo en *Bruñel.*

La romianoj konstruis ĉi tiujn kampar-domojn inter la 2-a kaj la 4-a jarcento p.K. La mozaikoj de la domoj estas belegaj.




- Kastelo en *Tiscar.*

El la origina kastelo starigita de la araboj nur restas sola turo. Estas vizitinda la "Groto de l'akvo", natura monumento ene de la kastelo kun impona akvo-falo. Laŭ rakontoj tie aperis la Virgulino de Tiscar antaŭ la granada reĝo Mohamed Abdon en la 14-a jarcento. Tuj

apud la kastelo troviĝas la preĝejo konstruita por honori la Virgulinon, ĝi posedas belan gotikan enirejon de la 14-a jarcento.

- Arko de la Sanktuloj.



Araba pordo en la vilaĝo. Supozeble oni rekonstruis tiun pordon sur alia romia pra-ekzistanta sur la sama loko.

Festoj

Dum la monato aŭgusto okazas la festoj de la Virgulino de *Tiscar*. En la aŭroro de la 29-a de aŭgusto okazas pilgrimado por porti la Virgulinon en preĝejon starigitan je 14 kilometroj el Quesada. Dum la monato majo okazas inverse, tio estas: dum la unua sabato de tiu monato, la quesada-anoj alportas la Virgulinon en la vilaĝon, tie ĝi restos ĝis la monato aŭgusto.

Gastronomio

Ne temas pri tipa andaluzia gastronomio, sed ĝi estas pli simila al tiu de la apuda La Manĉo. Ĉi tie oni preparas tipan gazpaĉon: *talarines*. La *andrajos*, similaj al tiuj de La Manĉo, estas kuirajo farita per viando, legomoj kaj fungoj.

Muzeoj

Quesada posedas du gravajn muzeajn spacojn, ene de la sama konstruajo. Unu estas dediĉita al Rafael Zabaleta, pentristo naskiĝinta en Quesadas. Li studis en Romo kaj poste en Parizo, tie li kontaktis kun Picasso. Li pentris la kamparanojn de sia vilaĝo laŭ sia persona

maniero vidi lumon, kolorojn kaj familiajn objektojn. Pentraĵoj de Rafael Zabaleta nuntempe estas eble vidi en muzeoj de Novjorko, Tokio, Bonaero kaj Lisbono.



"Viro, virino kaj knabino"
de Rafael Zabaleta (1907 – 1960)

La alia grava muzeo de Quesada estas la Muzeo de *Miguel Hernández y Josefina Manresa*. La poeto Miguel Hernández naskiĝis en la alakanta urbo *Orihuela*. Li edziĝis al Josefina Manresa, ŝi naskiĝis en Quesada en la jaro 1916. Post ŝia forpaso en 1987 la heredintoj de la poeto kaj la edzino akordis kun la Jaena Deputistaro la kreon de kultura spaco en Quesada memore al la alakanta poeto.

Venont-numere TURISMI EN ....

OLVERA (Kadizo)

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

La rolo de la volapukistoj en la frua disvastigo de Esperanto en Hispanio. José Rodríguez Huertas, la lasta volapukisto kaj la unua esperantisto en Andaluzio [1]

J.M.R.H.

Kiam oni pritraktas la ekigon de la internacia lingvo Esperanto en Hispanio, preskaŭ ĉiuj artikoloj komenciĝas per tiu unua libro eldonita en Malago de la instruisto José Rodríguez Huertas en la jaro 1890. La historiisto de la Esperanto-movado en Hispanio, Antonio Marco Botella, en la libro *"Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo"* sciigas informon eĉ pli antaŭa al tiu libro de la malaga instruisto. Tiel, la aragona esploristo asertis, ke en la jaro 1889 la bibliotekisto de la Hispana Senato, S-ro Joaquín de Arce y Bodega, respondis al la publika alvoko de D-ro Zamenhof, kun la sciigo, ke li estis preta lerni la novan lingvon internacian elpensintan de la pola kuracisto.




Menad Bal Pük Bal.
Unu mondo unu lingvo, jen la devizo de Volapük

Laŭ Antonio Marco, Joaquín de Arce sendis leteron al D-ro Zamenhof kaj poste, li ricevis de la pola aŭtoro de la nova internacia lingvo, eble, tri ekzemplerojn de la gramatiko de la nova idiomo. Unu el tiuj gramatikoj li sendis al José Rodríguez Huertas en Malago kaj la alian al la mont-inĝeniero Ricardo Codorniú en Murcio. Tamen, kiel dirite. Antonio Marco Botella mem

[1] Ci tiu artikolo aperis sur *BULETÍN* de Hispana Esperanto Federacio. Tamen, la aŭtoro decidis ankaŭ publikigi ĝin sur *Gazeto Andaluzia*, pro la fakto, ke ĝi rekte rilatas al elstara andaluzia esperantisto, verŝajne la unua esperantisto en nia lando, José Rodríguez Huertas.

asertis en siaj *Analoj*, ke tio *"eble"* okazis tiel. Do, mi ne pritraktos ĉi temon, ĉefe pro la manko de fidindaj historiaj fontoj. Tamen, tasko kiu ja povas esti realigita rilate la komencon de la Esperanto-movado en Hispanio, estas la serĉado de eĉ pli antaŭaj momentoj al tiuj ofte rakontataj en la libroj aŭ eseoj pri Esperanto en Hispanio.

Unue, estas necese aserti, ke Hispanio ne estis malsimila al aliaj eŭropaj landoj, se paroli pri la komenco de nia movado. Tio estas, la unuaj homoj kiuj lernis, disvastigis kaj renkontiĝis ĉirkaŭ la nova lingvo elpensita de D-ro Zamenhof estis antaŭe volapukistoj. Ni ne forgesu, ke la Volapukista Klubo en Nurnbergo (Germanio), fariĝis en la jaro 1889 la unua asocio favore al la disvastigo de la lingvo Esperanto aŭ eĉ la fakton, ke la unuaj plej elstaraj esperantistoj estis antaŭe volapukistoj (ekz. Antoni Grabowski). Do, en Hispanio okazis tute same.


EL VOLAPÜK

REVISTA MENSUAL LITERARIA Y CIENTÍFICA

MENADE: BAL PÜKI BAL.

El Volapük
Oficiala organo de *la Centro Volapukista Español.* Eldonita ekde la jaro 1886, unue en Madrido kaj poste en Gvadalaharo.

En Hispanio la unuaj volapukistoj renkontiĝis en la jaro 1885 ĉe la Volapük-branĉo de la *Centro Filológico Matritense* (Madrida Filologia Rondo). Estraranoj kaj membroj de tiu asocio estis la jam dirita Joaquín de Arce y Bodega, help-bibliotekisto en la Senato, katedratiisto de la hebrea lingvo kaj dekano de la instruistoj de la *Centro Filológico.* La sekretario de la Centro estis Casto Vilar y García, kadizano, kiu post tiuj jaroj estus nomumita katedratiisto pri la franca lingvo en sevila gimnazio kaj unu el la plej prestiĝaj poliglotoj en tiutempa Hispanio. La ĉefaj agadoj de tiu Volapük-sekcio estis la organizado de kursoj pri la lingvo de

[illegible] la jaro 1888 la apotekisto de Gvadalaharo, S-ro Francisco Fernández

Iparraguirre respondeciĝis pri la eldonado de la volapuka gazeto kaj organizis volapuk-branĉon ene de la *Ateneo Caracense,* la plej prestiĝa kultura centro en Gvadalaharo. Tiel, la ĉefa kerno de la Volapuka movado en Hispanio transiris el Madrido en Gvadalaharon, dank'al la agadoj de Iparraguirre kaj ankaŭ de Nicolás de Ugarte, komandanto instruisto en la Militista Akademio por Inĝenieroj, kiu ĝis la jaro 1932 sidejis en Gvadalaharo.



Milit-Akademio de Inĝenieroj en Gvadalaharo. Unu el la plej gravaj lululoj de la naskiĝanta Esperanto-movado en Hispanio.

Post la forpaso de Iparraguirre en la jaro 1889, Nicolás de Ugarte fariĝis la ĉefa respondeculo pri la eldonado de la volapuka revuo en Hispanio. La kontribuoj de la komandanto de la Inĝeniera Akademio ĉiam temis pri matematiko, scienco pri kiu li fakis kaj ankaŭ pri la problemo de la internacia komunikado pere de help-lingvoj. Li estis la aŭtoro de unu el la plej prestiĝaj verkoj en Hispanio pri ĉi tiu temo "*Proceso de Lengua Universal",* kie li elstaras la kvalitojn de Volapük por utili kiel internacia lingvo. Do, ofte, sur la numeroj de la monata revuo aperis informoj, ĉiam apenaŭ mallongaj sciigoj, pri la novaj projektoj de internaciaj lingvoj, ekz. la projekto *Visona* de la

usona Henry Cohn (1887); *Lingua* de George J. Henderson (1888); *Central Dialekt,* de la sveda August Nilson, ktp, same rilate Esperanton kiam aperis la zamenhofa lingvo. Tiel sur la numero de la revuo *El Volapŭk* de la monato januaro 1889 aperis jena informo:

> *"Otra lengua universal ha sido inventada en Varsovia por el Dr. Esperanto. Presenta, según el autor, esta ventaja inmensa sobre el volapük: que puede ser comprendida por las personas que jamás la han estudiado. He aquí la traducción en lengua Esperanto del primer versículo de la Biblia: Je la komenco Dio kreis..."*

En la monato julio 1889 Nicolás de Ugarte estis nomumita membro de la *Volapükakadem*, kune kun la bilbaoa José María de Zubiría, aŭtoro de lernolibro pri Volapük. Post tiu nomumo, la revuo eldonita en Gvadalaharo pleniĝis per komentoj pri gramatiko, eblaj reformoj, diskutoj pri korekta uzado de verbaj formoj, problemoj kun la refleksiva uzado kaj multaj aliaj gramatikaĵoj. Aperis do, la malsimilaj vojoj pro la lingvo Volapük proponitaj de Schleyer mem kaj kontraŭe de la plejmulto el la akademianoj. Tiel, en la monato aprilo 1890 Nicolás de Ugarte aperigas artikolon kie li plendas pri la problemoj por la estonteco de la lingvo kaŭzitaj de tiuj kvereloj inter la Pastro Schleyer, aŭtoro de la lingvo, kaj Auguste Kerckhoffs, direktoro de la Akademio kaj proponanto de kelkaj modifoj. Videblas tiam, ke Nicolás de Ugarte iasence seniluziiĝis pri Volapük kaj tio esprimiĝis okulfrape en la hispana volapuka revuo.

La numero de la monato oktobro de 1890 de tiu revuo estas tute malsimila al la ceteraj. Ses el la dekdu paĝoj de la revuo estas dediĉitaj al kompleta trastudo de la lingvo *Speranto*, fakte sur tiunumero nenio aperas rilate al Volapük. Nicolás de Ugarte bazas sian studon, kiel dirite, sur la broŝuro eldonita en 1887 de la propra Zamenhof en la franca lingvo, tamen li aludas ankaŭ al opinioj de juna ruso, Edgar de Wahl, favore al Esperanto. Tio pruvus, ke Nicolás de Ugarte ankaŭ posedis la unuan vortaron Esperanto-hispanan eldonitan de De Wahl en la jaro 1889. Oni devas diri, ke la artikolo verkita de Nicolás de Ugarte pri la lingvo de la D-ro Zamenhof ne estis tiu tipa mallonga sciigo pri

novaj lingvoj, sed tute male temas pri kompleta pristudo de la lingvo, oni parolas pri la sonoj de la literoj, pri la finaĵoj, pri pronomoj, pri verboj, tio estas, Nicolás de Ugarte ne nur sciigas pri la lingvo Esperanto, li verdire diskonigas ĝin kvankam li neniam ŝanĝis siajn preferojn rilate al Volapük, li eĉ skribis jenon:

> *"Tiene el Esperanto economía en la declinación y esto le ha proporcionado vocales sobrantes que emplear en terminaciones suaves. El volapük, sin declinación y empleadas las desinencias de ésta en terminaciones que la suavicen, es precisamente el sistema que nosotros hace tiempo habíamos propuesto."*

Nu, kiel dirite, Nicolás de Ugarte ne ŝanĝas sian opinion rilate la taŭgecon de Volapük, kvankam ne pri la originala, sed pri tiu modifita de la akademion kontraŭ la opinioj de Schleyer mem. Tiamanere en tiu longa kaj analiza studo de la lingvo de Zamenhof, okulfrape, aperas simpatiaj opinioj rilate la novan projekton. Tiel, Ugarte skribas:

> *"La intransigencia y la infabilidad de que se ha revestido Schleyer después del Primer Congreso en París, poniéndose abiertamente en frente de éste, da ventajas al esperanto, pero hasta ahora está aquél por encima de éste. Nos daremos por satisfechos con que de esta lucha nazca algo bueno y seguiremos impertérritos con nuestro propósito, es decir: abrazaremos lo mejor y más generalizado, y sobre todo desearemos que la humanidad dé un paso más en la senda del progreso. Sirva esto de contestación a cuantos nos hablan del esperanto como superior y sepan desde luego que no le perdemos de vista por si acaso, y así lo aconsejo a mis compatriotas pero sin pronunicarme a su favor."*

Tamen, en la monato novembro 1890 Nicolás de Ugarte forlasas la volapukan movadon pro la internaj problemoj inter Schleyer

kaj la akademianoj. Nicolás de Ugarte estis favora al la pozicio de ĉi lastaj, estritaj de Auguste Kerckhoffs. La lasta servo de Nicolás de Ugarte al la ideo pri utila help-lingvo kiu povus solvi la problemojn pri la internacia komunikado, estis tiu ampleksa kaj detala informo pri la lingvo Esperanto kaj tiuj informoj sendube, alvenis al la legantoj de la revuo kaj al ĉiuj membroj de la Volapuka Asocio en Hispanio, kiuj komprenis tra la paĝoj de la revuo kaj de la informoj havigitaj de Nicolás de Ugarte, ke la estonteco de Volapük ne estis certigita kaj ke ĵus aperis nova lingvo, multe pli facila kaj lernebla: Esperanto.



Pastro Johann Martin Schleyer
(1831 – 1912)
Aŭtoro de la lingvo Volapük



Auguste Kerckhoffs
(1835 – 1903)
Direktoro de la Akademio de Volapük

Joaquín de Arce y Bodega, prezidanto de la Volapuka Asocio lernis Esperanton; Casto Vilar y García, sekretario de tiu asocio, poste estus unu el la plej aktivaj esperantistoj en Sevilo kaj eĉ profesoro de la unua kurso organizita en la andaluzia ĉefurbo.

Kaj kio okazis en Andaluzio? Loĝis en nia lando ne multaj volapukistoj: Augusto Fritschi en Sevilo, bopatro de Fernández de Iparraguirre kaj ofta korespondanto kun Schleyer mem; la profesoro pri la franca lingvo en la gimnazio de Cabra en Córdoba kaj José Rodríguez Huertas en Malago. Rilate ĉi tiun ni povas diri, ke li naskiĝis en Guadix (Granado) en la jaro 1844. Li estis instruisto en Malago kaj li lernis la internacian lingvon Volapük. Sendube li konis

pri la ekzisto de nova lingvo elpensita de D-ro Zamenhof dank'al la informoj aperintaj en la revuo "El Volapük". Li ne nur estis lernejestro en la urbo Malago, li ankaŭ laboris en la redaktado de malgrandaj libroj, broŝurforme, kiuj povus esti utilaj por la lernado de malsimilaj branĉoj. Tiel, li estis la aŭtoro de libroj kiuj celis komprenigi la matematikojn, la biologion, hispanan geografion kaj ankaŭ en la jaro 1890 li decidis verki libro-metodon pri la nova lingvo Esperanto. Pri sia eksa volapuka agado kaj sia nova sindediĉo al Esperanto li sciigis en la antaŭparolo de la libro jenon:


> *"Más como hemos tropezado, digámoslo así, con esta nueva lengua, de excelentes condiciones y de más probabilidades de éxito que el Volapük, somos los primeros en arriar nuestra bandera para alistarnos resueltamente bajo la enseña que simboliza, conforme a nuestro humilde parecer, la más pronta y segurísima realización del progreso que tanto anhelamos."*

Kaj kvankam ĉi tiu unua libro estis rifuzita de Zamenhof mem, pro la fakto, ke en ĝi oni proponis kelkajn ŝanĝojn, ekz. forigon de la akuzativo, anstataŭigo de la litero "j" per "y", plifaciligo de la sono "gv" per "gu", ktp, estas necese aserti, ke Rodríguez Huertas informas pri tiuj eblaj ŝanĝoj ene de ĉapitro sub la titolo *"Reformoj proponitaj de la amantoj de ĉi tiu lingvo loĝantaj en Malago"*, tio estas; li admisias, ke la ŝanĝoj estas nur tio: proponoj kaj ne la lingvo de la D-ro Zamenhof. Tio estas, li admisias, ke la ŝanĝoj estas nur proponoj havigitaj al la aŭtoro de la lingvo por ebla konsidero kaj ne verdire la lingvo de la D-ro Zamenhof.

La ceteraj postaj aferoj jam estas sufiĉe konataj kaj facile troveblaj sur ĉiuj libroj eldonitaj rilate al la historio de la Esperanto-Movado en Hispanio. Do, estas tempo nun agnoski la laboron de tiuj volapukaj pra-esperantistoj kiuj ankaŭ en Hispanio diskonigis la ekziston de la nova lingvo kreita de D-ro Zamenhof kaj kies historio, feliĉe, daŭriĝas ĝis la kurantaj jaroj.

FLAMENKO

Enrique "el Mellizo"



Enrique Jiménez Fernández naskiĝis en Kadizo en la jaro 1848. Pro la fakto, ke lia patro havis ĝemelan fraton, li tuj estis konata kiel *Enrique, el hijo del mellizo* (Enrique, la ĝemelido) kaj ene de la flamenka mondo simple kiel *Enrique, el mellizo* (Enrique, la ĝemelo).

Profesie li estis buĉisto en Kadizo kaj ankaŭ banderilisto kiam tie okazis taŭro-ludadoj. Do, li kantis ne-profesie, nur tion faris okaze de malgrandaj festoj kaj familiaj renkontiĝoj. Li ludis antaŭ multnombra publiko nur kiam li bezonis gajni iom pli da mono. Enrique *el mellizo* estis la plej granda kadiza flamenka kantisto dum tiu epoko, kvankam bedaŭrinde, neniun son-registraĵon oni havas pri li. Oni diras, ke kia Manuel Torre, alia granda flamenka kantisto, aŭdis lin unuafoje, li eĉ ploris. Lia plej ŝatata kant-stilo estis la malagaj kantoj, kvankam li ankaŭ kantis alegriojn, segirilojn kaj tientoj. La flamenkaj esploristoj asertas, ke li estis unu el la plej gravaj kolonoj de la flamenka kantado fine de la 19-a jarcento, dum la tiel nomata: "Flamenka Ora Epoko". Li forpasis 58-jaraĝa en Kadizo.

Malagaj kantoj de *Enrique El Mellizo*

Frumatene je la dua, frumatene
mia frato laŭte min vokis
Stariĝu, mia frato, stariĝu,
ĵus mortis nia patrino kara
kaj ni restas nun en la mond' orfaj.

Ĉe mia balkon' sidita
la tutan nokton mi pasas,
ĉe mia balkon' sidita.
Kiam mi aŭdas viajn paŝojn lantajn
mia koro haltiĝas,
ĉar mi vin plene amas.

ANDALUZIA KUIRARTO

La Alboronio

La alboronio estas unu el la plej delicaj manĝaĵoj kreitaj de la al-andalusa kulturo. La vorto devenas el la araba *al-baraniyya* (kies traduko estas "delicaĵo") kaj la nomo estas tute ĝusta, ĉar ĉi tiu kuiraĵo el melongenoj kaj aliaj legomoj estas vera delicaĵo. Pli poezie alia rakonto asertas, ke la nomo devenas el la manĝaĵo preparita de la princino Al-Buran kiam ŝi edziniĝis al la kalifo Al-Mamun, laŭ la libro "Mil kaj Unu Noktoj".

La originaj ingredientoj en la al-andalusa versio de la alboronio estas melongeno, ajlo, kukurbo, migdaloj, nuksoj kaj aveloj. Tamen, post la alveno de novaj produktoj el Ameriko, oni aldonis tomaton kaj verdan paprikon. La graveco de ĉi tiu kuiraĵo estis tiel granda, ke ĝi fariĝis la ĉefa manĝaĵo dum festoj kaj nuptoj en Andaluzio. El nia lando ĝi iris norden kaj tie ricevis la nomon *"pisto"* (vegetal-fritaĵo). Multaj gastronomiaj esploristoj opinias, ke la alboronio estas la patrino de ĉiuj *pistos*, inter ili tiu de Madrido, de la majorka *tumbet* aŭ de la kataluna *xanfaina.* Kaj eĉ en Ameriko adaptiĝis ĉi tiu kuiraĵo al la tieaj produktoj, ekzemple en Kolombio oni aldonis maturajn bananojn.

Do, la alboronio estas kompleta kaj delica kuiraĵo kiun oni povas gustumi kiel ĉefa manĝaĵo aŭ akompanita ĉefe de fiŝo.

<u>Jen la necesaj ingredientoj por 4 homoj:</u>

- 4 melongenoj.
- Kukurbo, ½ kilogramo.
- 1 malgranda kukurbeto.
- Tomatoj, ½ kilogramo.
- 1 granda cepo.
- 3 ajleroj.
- 1 kulereto da dolĉa papriko.
- 1 kulereto da vinagro.
- Oliv-oleo.
- Salo.
- Papriko.

Jen la preparado:

1.- Senŝeligu la melongenojn kaj la kukurbon. Tranĉu ilin laŭ malgrandaj kubetoj kaj bolu ilin dum 10 / 15 minutoj. Il devas resti molaj.

2. Same, tranĉu la malgrandan kukurbeton (ne estas necese senŝeligi ĝin). Ni tranĉas la cepon kaj la ajlerojn. Ni friktetas ĉi tiujn ingredientojn en kaserolo dum kelkaj minutoj, ne multaj, ĝis kiam la cepo rostetiĝas.

3.- Tiam, oni demetas la kaserolon el la fajro kaj ni aldonas la paprikon, vinagron kaj la dolĉan paprikon. Denove oni metas la tutaĵon sur la fajro kaj ni aldonas la tomatojn, antaŭe senŝeligitaj kaj tranĉitaj. Ĉi ĉio devas esti sur la fajro dum 5 minutoj.

4.- Aldonu la melongenojn kaj la kukurbojn kaj iomete da salo. Ni kovras la kaserolon kaj kun ne-intensa fajro, ni atendas 4 minutojn.

Bonan Apetiton !

Ĉi-recepta vortaro:



Melongeno



Kukurbo



Cepo



Ajleroj



Tomatoj



Oliv-oleo



Salo




Vinagro



Kaserolo

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

Spontanaj ekbruloj en Laroya (Almerio)



Unu el la ĉemizoj spontane ekbruligita en Laroya en la jaro 1945

Sur alia numero de nia revuo oni jam parolis pri la tiel nomata: "spontana ekbrulo". Temas pri misteraj okazintaĵoj provokantaj sen-kaŭzajn ekbrulojn de homoj aŭ objektoj. Unu el la plej klaraj ekzemploj pri tiu spontana ekbrulo okazis en la almeria vilaĝo *Laroya*.

La 16an de junio 1945 kelkaj konstruaĵoj brulis. La fajroj komenciĝis ĉe konkretaj lokoj kaj objektoj, tiel, la vestaĵo de infano dormanta ĉe sia lito aŭ la laboriloj en unu el la kampar-domo. Kompreneble, ĉiuj ekpensis, ke temis pri senskrupulaj fajro-maniuloj kiuj bruligis domojn en la vilaĝo. Do, la enloĝantoj organizis nokto-gardajn grupojn por protekti sin kontraŭ tiu(j) frenezulo(j).

Tamen, baldaŭ tiuj nokto-gardistoj vidis, ke la bruloj komenciĝis ĉiam per blank-koloraj lumoj kiuj ekaperis tuj meze de la aero. Tiutempe la vilaĝo havis nek elektran energion, nek ekzistis tie benzinujo aŭ gasujo. Oni informis pri ĉi ĉio al la Civil-Gvardio de la apuda vilaĝo *Macael*, tiel, kelkaj policanoj venis en *Laroya* por esplori. Dum tiuj esploroj unu el la ĉefoj de la Gvardio vidis, ke sia kapoto brulis kiam li pendumis ĝin trankvile sur vest-hoko en unu en la domoj. Tuj, la ĵurnaloj ekinformis pri tiuj strangaj okazintaĵoj kaj la

aŭtoritatuloj decidis pristudi la aferon science, ĉar estis necese trankviligi la enloĝantaron. Sciencistoj de la Supera Konsilio de Sciencaj Esploroj venis en la vilaĝon kaj post longa studado ili sciigis, ke tie ekzistis nek vulkanoj, nek geologiaj problemoj, nek elektraj fenomenoj, nen suna radiado. Do, laŭ la spertuloj, la spontanaj ekbruloj ne havis konkretan sciencan kaŭzon. Baldaŭ ĉesis la atento de la ĵurnaloj kaj la provincaj aŭtoritatuloj ordonis silenti tiajn aferojn. En la tiutempa Hispanio la religio ne permesis diskonigi tiujn strangajn kaj eĉ *diablajn* aferojn.



Fotografaĵo aperinta sur unu el la tiutempaj ĵurnaloj.
Civil-gvardisto rigardas brulitan vestaĵon.


Antaŭ kelkaj jaroj, grupo de spertuloj pri parapsikologio denove ekstudis tiun aferon. Tiuj kiuj ankoraŭ memoris tion kio okazis en la jaro 1945 sciigis, ke la bruloj komenciĝis ĉiam apud la familio de knabino konata kiel *"La niña de los fuegos"* (La knabino de la bruloj), kelkfoje eĉ la vestaĵo de la knabino brulis. Post kelkaj jaroj la knabino sinmortigis per veneno, ŝia frato, kelkajn tagojn poste, ankaŭ sinmortigis. Tiam la fajroj definitive ĉesis. La enloĝantoj opiniis, ke ili havis, iamaniere, la kulpon de tiuj strangaj okazintaĵoj.

Aliaj parolis pri infano trovita kelkajn monatojn antaŭ la bruloj. Li aperis perdita ene de groto, li estis tre malalta kaj aspektis kvazaŭ kadavro. Laŭ tiuj kiuj vidis lin, ĉirkaŭ li ekzistis stranga lumo. Tamen post kelkaj tagoj la infano malaperis.

Ĉi tiuj strangaj aferoj pri spontana brulado okazis en diversaj lokoj. Neniu plia afero okazis en *Laroya* post la jaro 1950 kaj nuntempe ĝi estas belega kaj kvieta vilaĝo en la almeria provinco kie, nuntempe, nur la maljunuloj memoras pri tiuj strangaj okazintaĵoj. La esploristo Pedro Amorós tamen montris en unu el siaj verkoj pri misteroj en Andaluzio, ke ne estis la unua fojo kiam tiaj strangaj fenomenoj okazis. Jam en la jaro 1561 la Inkvizicio ekigis juĝan proceduron kontraŭ Juan de Benavides, islamano kiu devis perforte kristaniĝi. Dum la proceduro la akuzito deklaris, ke la lumoj aperintaj ankaŭ tiam, *estis signo de la Profeto ĉar tiuj signoj estis pli bonaj kaj povaj ol la kristana kruco.* Ŝajnas, ke ne estis en la jaro 1945 kiam aperis unuafoje strangaj lumoj kaj fajroj en tiu almeria zono.



Krucvortenigmo



1. Akuzative, eseo, disertarcio, prezentota al akademia societo.
2. Inverse, maloftaĵo ■ Cifero.
3. Akuzative, parto de la kolo. ■ Konsonanto.
4 Sufikso de la pasiva futra participo, esprimanta agon aŭ staton ankoraŭ ne komencitan. ■ Adverbe, fariĝos io en iu loko aŭ tempo, sendependе de nia volo.
5. Planto en tropikaj arbaroj, tre utila por salti de unu arbo en alian. ■ Sufikso signifanta unu el la konsistigaj elementoj de tutaĵo.
6. Inverse, komenco. ■ Unu el la plej modernaj artoj.
7. Akuzative, brita mezurunuo de longo. ■ Konsonanto.
8. Inverse, plurale kaj akuzative, malplena interspaco. ■ Konsonanto.

A. Akuzative, anoj de azia dinastio.
B. Plurale, temantaj pri amo.
C. Sen la lasta vokalo, vasta etendaĵo de sala akvo. ■ Spirebla gaso, kiu ĉirkaŭas la teron.
Ĉ. Akuzative, maniero vigle pliradigi ion. ■ Cifero.
D. Vokalo ■ Inverse, arkitektura kaj ornama stilo en Eŭropo dum la 18-a jarcento.
E. Adjektive, litero gravurita sur ligno, el alfabeto uzita de la ĝermanaj triboj antaŭ sia kristaniĝo. ■ Sufikso de la aktiva preterita participo, signifanta, ke la ago plenumite jam finiĝis.
F. Sufikso uzata por derivi numeralojn. ■ Sen la lasta vokalo, Budhisma skolo.
G. Plurale kaj akuzative, cifero montranta la vicon de iu objekto inter aliaj.

Solvo al la pasintnumera krucvortenigmo.

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G
1	K	R	O	K	O	D	I	L
2	A	■	K	O	R	■	N	E
3	S	T	O	M	P	O	■	G
4	T	A	L	O	■	K	I	E
5	E	N	■	■	K	O	R	N
6	L	I	A	■	A	K	I	D
7	O	N	I	K	S	O	■	O
8	J	A	N	U	A	R	O	N


Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝanĝus ion?
Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?
Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:


esperanto14@ono.com



HUMURO

Horor-filmo !!!





Ĉi tio nomiĝas "legi" kaj tiel nova softvaro instaliĝas en vian cerbon.

La numero 105-a de nia revuo aperos dum la monato julio 2017. Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

esperanto14@ono.com

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

★

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Viceprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Antonio Rodríguez Gasch
Juan García del Río

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

TTT-paĝo: www.esperanto.ac
Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net

21-a Andaluzia Kongreso de

ESPERANTO

TORROX

De la 12-a ĝis la 15-a de Oktobro 2017

'Esperanto kiel turisma lingvo'



SOLO PIXEL

aeu
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto